**Protokolo de la 39-a Ĝenerala Asembleo** de la Scienca Sektoro de AIS okazinta en Sibiu-Hermannstadt (RO) dum SUS 32.

Kunsidtempo: Merkredo, 2011-09-28, 15:00–18:00; sabato, 2011-10-01, 16:30–16:35.

1) F*ormalaĵoj.* La kunveno okazas laŭ la kunsidregularo. La kunsidon gvidas prezidanto OProf. Pennacchietti (en la dua parto OProf. Quednau); la protokolon verkas OProf. Fössmeier. La kunveno estas kvoruma, ĉar ĝi elektas novan senaton. En la tagorda ero 5 okazu decidoj pri kvar proponoj, kiuj evidentiĝas el tiu ĉi protokolo.
2) Ĝ*enerala raporto.* OProf. Pennacchietti kaj Minnaja raportas kiel prezidanto kaj vicprezidanto. La san-marina asocio AIS kunvenis kaj tribunale deponis sian bilancon, per tio plenumante siajn jurajn devojn en San-Marino. La kongresa universitato AIS-IKU kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago okazis sukcese kaj estis tre laŭdata de la responsa UEA-estrarano OProf. Wandel. El kunlaboro inter OProf. Minnaja kaj EProf. Preradović rezultis kontribuo al konferenco pri la Danuba Valo.

   OProf. Quednau raportas por la ekzamenofico, ke ĝis nun 145 AIS-studentoj bakalaŭriĝis kaj 95 magistriĝis; 36 nun studas.
3) F*inanca raporto.* Ankoraŭ ne estas disponebla financa raporto; tial ne eblas senŝarĝigo de la estraro. (Komparu la decidon sub tagordero 5d.)
4) D*ecidoj.* Nenio decidenda.
5) K*romaj tagordaj punktoj.* La ĜA decidas pri jenaj proponoj:
   a) Pro la malfacila laborsituacio la ĜA unuanime rajtigas la senaton devii de la regularaj preskriboj, se tio necesas pro manko de laborforto.
   b) La ĜA unuanime taskas al OProf. Quednau, ĝis la fino de 2011 publikigi en reta formo la aktualigitajn versiojn de la ekzamen- kaj instruregularo.
   c) La ĜA fondas konsilion de „sciencaj garantiantoj“, kiuj decidas pri la sufiĉeco de la scienca nivelo de instru-tekaj kursoj kaj pri la kreado de novaj studaddirektoj. La membrojn de tiu konsilio alvoku la senato.
   d) La ĜA sen kontraŭvoĉoj postulas de OProf. Wickström la pretigon de aktuala bilanco ĝis la fino de novembro 2011 kaj komisias al EProf. Sara Konnerth kontroli la staton de la librotenado de AIS.
6) E*lektoj.* La ĜA decidas, ke en la senato por 2012–2015 estu kvin senatanoj, kaj elektas la profesorojn Fössmeier, Maitzen, Poláková, Quednau kaj Wickström. Por kompletigi la senaton ĝi elektas ses vicsenatanojn en jena vicordo: Minnaja, Pennacchietti, Lobin, Corsetti, Wandel, Korĵenevskaja-Gouriou.
7) D*iversaĵoj.* Nenio.

Sibiu-Hermannstadt, 2011-10-01
*F. A. Pennacchietti, kunsidestro*
*R. Fössmeier, protokolanto*